Raporto pri "Esperanto, Pasporto al la tuta mondo”

Nia DVD kurso "Esperanto, Pasporto al la tuta mondo" estas pli spektata ĉijare. Ne temas nur pri vendado de la DVDoj mem sed ankaŭ pri aliaj eblecoj por individuoj spekti ĝin. Ĝi estas regule uzata dum NASKaj klasoj kaj por lingvistika kredito en la Universitato de Kalifornio, San Diego. Tie ili povas studi uzante la diskojn en la lingva-labotorio, kaj eĉ eksameniĝi sen vere partopreni klasojn.*

Dum nia estrar-kunsido en Montrealo, Robert Read kaj Steve Brewer konvinkis min ke ni ne perdus monon, se ni metus Pasporton en la reto. Kaj Roberto komencis labori por trovi taŭgan personon fari tion. Sed antaŭ ol komenci, Robert Read promesis krei reklamon por "Pasporto" por la gazeto, *Language Magazine*. Steve Wagenseller multege laboris kun Roberto kaj mi por krei belegan multkoloran kvaron-paĝan reklamo. Ĝi aperis en decembro 2008. Ni esperas ke tiu estos efika reklamo por Esperanto.

Steve Wagenseller ankaŭ preparis novan belegan kovrilon kiu inkluzivas la fakton ke ĝi nun inkluzivas subtekstojn por la vortoj de la instruistino en 15 lingvoj ĉina, angla, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, korea, malta, persa, portugala, rumana, rusa, kaj kompreneble Esperanta. Se vi ankoraŭ ne vidis tiun tre belan profesie aspektan kovrilon, nepre vidu ĝin en la libroservo dum la kongreso.

Steve Wagenseller nuntempe enmetas la polan por speciala Bjalistoka versio! Se eble, venonta jaro ni esperas ankaŭ enmeti la araban - ĉar tiam ni havos ĉiujn ĉefajn lingvojn en la mondo. (La araba lingvo estas la 4a aŭ 5a pli ofta uzata lingvo en la mondo. Ĉu vi sciis tion?) Mi nur en la lastaj jaroj lernis ke parolantoj de persa kaj parolantoj de araba ne povas legi la lingvon de la alia. Interese, ĉu ne?

Speciale pro la bela reklamo en *Language Magazine*, la redaktoro de *Language Magazine* petis ke Roberto verku (kun la helpo de Steve Brewer), artikolon - 2 paĝan kolorigitan! Tre elstare. Se vi ne ankoraŭ legis, vi trovos ĝin ĉe: http://www.languagemagazine.com/linternetedition/langmag_pages/Esperanto_Apr09.pdf.

Jam aperis en la reto ne nur la kantoj kaj aliaj pecetoj de Pasporto - sed ankaŭ la tekstoj de ĉiuj16 lecionoj! Iu viro el Koreio nomata "Masoris" dividis la lecionojn en multajn pecojn kaj metis ilin en You Tube. Mi ne donis permeson al li fari tion, kaj mi ne estas kontenta pri la formato. Ĝi rompis ĉiun lecionon en almenaŭ 3 partojn - 47 entute, kaj donis konfuzajn, ne facile uzeblajn titolojn. Mi tuj sendis leteron al "Masoris" dankante lin pro lia ideo - sed ke ni insistas ke li ŝanĝu la formaton. Post ni enmetas pli bonajn versiojn (kun anglaj
subtitoloj), tiam li devos forigi tiujn kiujn li enmetis kaj re-enmeti ilin - kun koreaj subtitoloj. Nuntempe Ed Williger laboras por krei la formaton kiu povas esti uzata de aliaj por aparte enmeti subtitolojn de ĉiuj lecionoj. Ju pli Esperanto aperos en You Tube - des pli konata ĝi fariĝos.

Intertempe Emilio Cid, bona esperantisto en Brazilo, kontaktis min pri ideo enmeti ne nur pecetojn de la lecionojn - sed tutan lecionon en nova formato en la reto. Ni

nun kunlaboras por fari tion. La nova formato permesas enmetadon de tuta leciono - ĝis 30 minutoj en unu peco! Li ankaŭ opinias ke ni povas meti ĝin en niaj hejmpaĝo kun ebleco elekti iu ajn subtitolon. Ni ne certas ke tio eblas, sed ni vidos.

Duncan Charters kaj mi prezentos ideon pri tio dum kongreso en St .Louis kaj ĉe ILEI en Krakovo kaj ĉe la UK en Bjalistoko. Aferoj progesas!

Lusi Harmon
Komisiito, Aud-Vida Instruado

(*) Mi ne opinias, ke multaj studantoj lernos Esperaton uzante nur la reton. Sed ju pli la vorto la Esperanto - kaj materialoj por lerni ĝin - aperos, des pli ni profitos interesi aliajn pri ĝi. Krom tio, mi opinias ke la reto estos bona helpilo al instruistoj - ĉar tiam la studantoj povas je oportuna tempo ofte respekti ĝin.